— In Mexicostad had een Esperantotentoonstelling plaats in het Paleis van Schoone Kunsten.

### ARGENTINIE.

Van 18 — 29 September had in Buenos-Aires het eerste Amerikaansch taalkongres plaats. Gedurende dat kongres werd het voorstel ingediend om Esperanto in te voeren op de normaalscholen. Het voorstel oogstte bijval en aanbeveling.

### MALICA.

— Sciu, karulo, ke mi kantis en ĉiuj kortegoj.  
— Kaj ĉu la pordistinoj lasis vin fari?

Dimanĉo! Pluvema vetero, grizaj nuboj, malsekete kaj malvarmete! Ĉio malgaja! La soldatoj loĝas en vent-trablova grenejo.

Karlo sentas sopiron al hejmo — li pensas al sia familio, al sia fianĉino..... la koro varmigas.....

Ne pripensu! For! — Li devas foriri, trinki... Johano kuniras; ili serĉas amuzon, jes amuzon! Ili eniras malgrandan trinkejon; kriega muziko — fivirinoj..... Ili eliras.

Denove, la du amikoj aŭdas muzikon; trenan tangon: si... si... si... Ili eniras, povas rimarki nenion. Ĉio estas normala. Bela valso eksonas, komenciĝas danco. Ili parolas kun la du filinoj, vere amindaj fraŭlinoj — ili povas agrable babilu, afable ridi, kore aminde rigardi. Ili estas mirindaj.

Eksonas la deka vespere. Tamen, la soldatoj restas kaj dancas ĝis la la kaj returnas tiam zigzage.

Matene, ili ne povas ellitiĝi, ili dormas, dormadas. Vespere, ili foriras kaj denove vizitas la kafejon. Ili estas ricevataj amikege. Sekvas dancado kaj babilado.

Ne ĝeniĝu! estas tiel bonege tie ĉi. La sekvantan tagon ili estas venigitaj al la komandanto kaj estas punitaj.

Vespere, ree ili foriras. Kial timi, se oni vidos la karajna virinojn?

— Kion vi pensas pri Manjo?  
— Mi amas ŝin.

— Kaj mi, amiko, mi sentas ion, jes ankaŭ mi amas ŝin.

— Mi bone kredas..... kaj kion vi pensas pri Leonjo?

— Ŝi estas bela, bona, sed malpli ol la mia.  
— Kion vi diras? malpli bela, bona, kara?

— Bah!  
Ili koleriĝas. Granda diskutado sekvas.

Ili eniras unu post la alia... kaj returnas solaj. Manĝi kaj dormi estas al ili ne plu eble, sed ĉiam revu pri la karaj amikinoj.

Ĉiun tagon ili estas punataj, sed ankaŭ ĉiun vesperon ili forkuras.

La sekvantan dimanĉon ili envenas la kafejon je la 7a. La mastro kaj mastrino estas solaj en la salono.

— Kie estas Manjo? Kie estas Leonjo?  
— Ili iris al la kinejo.

— Do, ni atendos.  
Ili enuas — ekstaras — promenas — eksidas.

— Se ni scius al kiu kinejo.  
— Je kioma horo ĝi finiĝos? Ni serĉos ilin.

— Ne..... ni atendu!  
Eksonas la 11a, la 11a kaj duono.....

Je la 12a la du knabinoj eniras..... akompanataj de du fraŭloj.

— Bonan vesperon Manjo! Bonan vesperon Leonjo!

Ni atendis vin jam de la 7a. Kial vi ne diris, ke vi eliros? Kiam estos nia vico?

— Pardonu, jen mia fianĉo. Ankaŭ li estas soldato kaj li vizitis min dum sia libertempo.

La du soldatoj eliras hontigitaj, ne plu parolas... pensas... pensadas.



— Kion vi pensas, Karlo? Ĉu ni ne restus estonte en la grenejo, ĉe niaj amikoj?

Hejme ja alia persono atendas nin, fidante nin kaj tutkore dezirante, ke ni returnu kiel eble plej rapide.

— Jes, estas vere! — Venu, ni dormu!

Serĝento A. V. Leuven.

## :- Medito por la monato. -:

En la nederlanda armeo la grupestroj ordonas antaŭ kaj post la manĝo silenton al ĈIUJ, por ke la religianoj povu senĝene preĝi. Kaj ĈIUJ malkovras sian kapon dum la aliaj preĝas. Kaj oni faras tion respektive.

Kion vi faras? Ĉu vi preĝas matene kaj vespere, antaŭ kaj post via manĝo, ankaŭ en la armeo? Aŭ, ĉu vi eble ne kuraĝas tion? Ĉu vi eble hontas pri la plej bona, plej bela, plej valora, kion vi posedas en la mondo? Tiam la nekredantoj pravas, se ili malrespektas vin.

Ĉu vi volas respektigi vin? Estu tiam kuraĝaj eĉ aŭdacaj unue kaj precipe rilate al viaj religiaj konvinkoj kaj devoj, ne silentu se oni atakas nian religion, sed elmontru ĝin per viaj agoj, paroloj kaj precipe per via heroo amo al ĉiuj; la amo ja estas la esenco de la Kristanismo. Tiam oni respektos kaj amos vin.

Vi ne estas en milita kampo, sed vi estas nun pli ol iam en la batalkampoj de la armeo de Kristo Reĝo! Ne forgesu tion!

Sacerdoto.

## PROPAGANDU!

Unu el niaj propagandistoj, serĝento X, mendis jam 30 gramatikojn por siaj lernantoj en la armeo. Kiom da lernantoj vi havas?

Letero el Nederlando.

### MOBILIZON!

Amikoj en Flandrujo!

En nia nederlanda monato gazeto mi legis, ke pro la milito, la flandra katolika Esperantomovado malfortiĝis.

Ĉu estas vere? Mi ne povas kredi ĝin. Nun la Esperantomovado ja estas tre necesa.

Ofte mi vojaĝis tra Belgujo. Ĉiam denove mi admiris la belecon, sed precipe la atablan kaj kuraĝan popolon. Ne, ne, mi ne povas kredi, ke pro la milito la Esperantomovado ĉe vi malfortiĝis. Tio estas terura por vi sed ankaŭ por viaj nederlandaj amikoj.

Ni estas fieraj pri niaj flandraj najbaroj.

Flandraj amikoj, ankaŭ ni hodiaŭ havas malfacilan tempon, sed ni batalos kuraĝe, ĉar estas necese. Via kaj nia devizo estu: «mobilizon de ĉiuj Esperantistoj» kaj «restu fidelaj».

Nederlanda amiko,  
Ant. de Geus, Hago.



### EKSIGO.

Nia delegito por Bornem kaj ĉirkaŭajoj petis ekzigon pro diversaj privataj kialoj. Kvankam ni tion bedaŭras, ni akceptas tion kaj dankas lin pro la farita laboro por F. U. K. E.

### ESPERANTO KURSO.

Ni kontente aŭdis ke en St. Amands-Puurs, S-ro Van de Laak organizis Esperanto-kurson kaj ke al la unua leciono sin prezentis 20 gelemantoj. Post propagandado li esperas certe altiĝi tiun nombron. Ni deziras al li grandan sukceson kaj dankas pro la servo, kiun li faras al nia movado.

### RAPORTO S. I. K. KUNVENO 27-11-1939.

S-ro Prims, Viceprezidanto anstataŭis F-inon De Rop, malhelpata pro profesia laboro. Li montriĝis bona paroladisto kaj kiel ĉefa rimarko en sia enkondukita vorto, li insistis por ke la klubanoj ekspluatu la klubvesperojn por regule kaj nur paroli esperantlingve. Ne timu, li diris, se kelkfoje vi donofalas sur momente ne trovebla vorto. Ĉe ĉiuj, eĉ ĉe la plej spertaj tio okazas kaj fidu ĉiam je iu vivanta vortaro en via medio.

La sekretariino, laŭtlegis la raporton pri la antaŭa kunveno, kiu estis aprobata. Sekvis laŭtlego de la envenintaj leteroj de niaj soldatoj. Tio de S-ro V. d. Bergh, kiu aludis al certaj judaj manieroj ĉe iu en nia klubo, vekis ĝeneralan ridon. Ankaŭ dirajo el letero de S-ro Goethaert, kiu promesis regule kaj fervore uzi Esperanton «kiam ni denove estos gajnintaj tiun ĉi militon».

Por la komuna kantado nia klubo akiris valoran helpon en la persono de S-ro V. d. Moeren, kiu akompanas la gekantistojn per sia mandolino. Li ankaŭ promesis instrui al ni la F. U. K. E. kanton, sed necesas unue trastudado de la melodio.

S-ro Jacobs, skribante frazon plena je eraroj sur la tabulo, gvidis la punkton «Ni lernu per la eraroj». Disvolviĝis interesa diskutado pri certaj gramatikaj reguloj. S-ro Prims akceptis la sekvantan vicon.

Kiel interludo sekvis komuna Kan-u-go sur la nigra tabulo, al kiu la tuta klubo partoprenis, ĉiuj konkurante por trovi radikojn por formi krucvorton. Je certa momento la gvidanto devis halti tro laboreman klubanon, kiu ŝajne forgesis ke la tabulo ja havas ankaŭ limojn.

Sekvis preparolado de la aranĝo por nia sekvanta kunveno, kiu okazos ĉirkaŭ Kristnasko. Ni decidis kanti, legi, deklami pri Kristnaskaj temoj kaj multaj promesis sian kunlaboron. Verŝajne ankaŭ okazos nova montrado de la filmo pri Nia XXI-a de S-ro Lernout.

Poste kanto de «La Espero», adiaŭa vorto de la Prezidanto kaj preĝo ni disiris, ĉar jam malfruiĝis por ankoraŭ ludi Kan-u-Go aŭ Leksikon.

### KATOLIKA RONDO ESPERANTISTA, MORTSEL.

Mort-sel ne mortos! K. R. E. M. volas esti kaj

resti «kremo»! Malgraŭ la tiama maltrankvilo, la 19-an de septembro s-ro Vermuyten malfermis kurson en la lernejo Eggestraat. Sed ĉar nur kvin kuraĝuloj sin anoncis, laŭ iniciato de nia kasisto s-ro François Laroche, pluraj aktivaj membroj kunvenas samtempe (marde de la 9a ĝis la 10a) tiel sin pretigante daŭrigi la normalan grupan vivon en kutima ejo... kiam la registraro kompatos la «trinkemulojn» ankaŭ... post la 10a vespere.

### ATENTU!

La supra parto estis jam kompostita por la antaŭa numero sed ne povis aperi pro manko de loko.

### ALGEMEENE JAARVERGADERING.

Ons Verbond zal dit jaar zijn algemeene jaarvergadering houden op Onzes Heeren Hemelvaartdag te Brussel. De dag zal worden ingezet met een Heilige Mis waaronder preek in Esperanto. Daarna vergadering. 's Middags gezamenlijk middagmaal. Na de middag een excursie. Degenen, die verlangen voorstellen in te dienen voor deze vergadering, gelieven dat tijdig te doen aan het adres van de Voorzitter.

Nadere bijzonderheden over deze samenkomst zullen worden vermeld in ons volgend nummer.

### FLANDRA KATOLIKO POR NIAJ SOLDATOJ.

Multaj el niaj anoj-soldatoj travivas malfacilajn tempojn. Estas nia devo helpi ilin laŭeble. Nia estraro tial decidis la FUKEmembrecon kun abono por la soldatoj fiksi je 10 fr. anstataŭ 20 fr. Niaj pli feliĉaj geanoj povas, pagante 10 fr., havigi membrecon-abonon al iu soldato de ili mem elektita. Se oni ne indikas la nomon de la soldato la estraro mem elektos lin. Jen la unua listo:

L. C.	10 fr.
S-ro Bleyer el Den Haag (Nederl.) por 2 soldatoj	20 fr.
V. D. (por F. V. de Vijver)	10 fr.

### SENPAGA ESPERANTOKURSO POR SOLDATOJ.

Post anonco de tiu kurso en kelkaj gravaj gazetoj sin prezentis multaj soldatoj. La kurso estas donata laŭ la Witterijk-metodo. La aĉeto de la libro estas la sola elspezo ne-

cesa por la soldato. Ni kore dankas sinjorojn Van Deun, Vangeel, Jacobs kaj Prims, kiuj akceptis gvidi tiujn kursojn kaj deziras al ili laboremajn kaj fidelajn lernantojn.

### SKELDA INSTRUISTOJ-KLUBO, ANTWERPEN.

La 22-an de Januaro okazis dum la klub-vespero, la montrado de la filmo pri nia XXI-a. Estis agrabla revido por multaj kaj por la aliaj interesa supervido de la pasintjara grava okazintaĵo. Malgraŭ la glacia vetero ni ĝojis pri kontentiga ĉeesto. Sinjoro Lernout ne nur rikoltis laŭdajn vortojn de la Prezidantino sed ankaŭ flanke de la gevidantoj aŭdis dankeman aplaudon. Li vere meritis tion, la filmo estas ja grava kaj lerte kunmetita dokumento, kiu eternigis ĉiujn personojn kaj okazintaĵojn el nia XXI-a.

La Prezidantino fine esprimis la deziron, ke li baldaŭ povu montri sian filmon al Nia XXII-a; signifos, ke denove regas la Paco, la feliĉo kiun ni nun tiom alte taksas.

### LA LOVENA KRUCO, LOVENO.

Pluraj el niaj membroj estas de la komenco «ie en Belgujo», kelkaj inaj elementoj ne trovas facile tempon pro Ruĝa-Kruco-okupoj, sed la fideluloj timas nek froston nek neĝon por ĉiusemajne viziti la lundan kunvenon en nia ejo Sociale Werken, Vaartstraat. Ili vivtenas la flamon ĉirkaŭ kiu ni esperas plej baldaŭ revidi ĉiujn kun re-novigita fervoro.

NM.

### EN LA F.U.K.E.-FAMILIO

#### Naskiĝoj.

En la familio de nia ano Joz. Goethaert - Jespers, naskiĝis la 4a infano, kiu en la Sta Bapto ricevis la nomon Jozef. Ankaŭ gesinjorojn Van den Bergh en Merksem, Dio benis per 5a infano, kiu je la feliĉo de la patrino estas filineto kaj estis Baptata sub la nomo Magda.

Ambaŭ patroj estis soldatoj, sed pro tiuj ĉi feliĉaj okazintaĵoj ili liberiĝis. Ni ĝojas kun ili kaj esperas, ke ili povos resti hejme.

#### Funebroj.

Nia anino, Alice Van Slagmolen en Bonheiden, perdis sian karan patrinon. Ŝi estu la konsolo kaj subteno de sia patro. Ankaŭ nia ano Jozef Van Oost en Loveno, bedaŭras la morton de sia patrino. Al la funebrantaj familioj FUKEmembreco prezentas siajn plej kristanajn kondolencojn.



# KION ALIAJ SKRIBAS?

Tiu ĉi rubriko estis jam kompostita por la antaŭa numero sed devis esti prokrastata pro manko de loko.

## HEROLDO DE ESPERANTO.

En artikolo «La enigmo de Esperantokonstruo» Petro Stojan pritraktas la multe diskutatan problemon, ĉu la radikoj en Esperanto estas tute neŭtraj aŭ ĉu ili estas radikoj de substantivoj, adjektivoj aŭ verboj. Tiu problemo ne estas solvita ĝis nun. Kelkaj diras, ke la radikoj estas neŭtraj, aliaj ke ili estas substantivaj, adjektivaj aŭ verbaj.

Petro Stojan asertas: ambaŭ grupoj eraras; la unua grupo, tial ke vere estas diferenco inter la radikoj. Ekzemple la ideo de la radiko **dom** estas alia ol tiu de **bel**, kaj ankaŭ alia ol tiu de **star**. La radikoj do ne estas neŭtraj. La dua kategorio eraras, laŭ Stojan, tial ke ili nomas kelkajn radikojn substantivaj, adjektivaj aŭ verbaj. Tio ne estas ĝusta, ĉar sen la sufiksoj **o**, **a** aŭ **i**, ne ekzistas substantivo, adjektivo aŭ verbo, do ankaŭ la radiko tiam ne povas esti substantiva, adjektiva aŭ verba. Li konkludas, ke la radikoj estas neŭtraj gramatike, sed ke vere ekzistas **idea** kategorio.

Stojan pravas dirante, ke estas vera diferenco inter la radikoj, sed kial tiu subtila eltrovo, ke oni tamen ne povas diri, ke ili estas radikoj substantivaj, ktp.? Oni ne diras ke la radiko **dom** estas substantivo sed substantiva, kio signifas ke la ĉefvorto, la origina vorto estas substantivo, ke la radiko estas do substantiva, aŭ substantiv-idea.

En la kongresraporto en Heroldo n-ro 1035-36 la redaktoro diras je la fino: «Multaspekta estas la mondo, multaspekta estas ankaŭ la Esperantomovado. Ne domaĝas. Laboristoj (oni intencas: socialistoj) povas plej eble labori en siaj rondoj per propra laborista organizo; katolikoj plej facile atingas proprarondanojn, se ili estas organizitaj en sia speciala katolika asocio. Tio ne ekskludas amikan kunlaboradon kun la neŭtrala Ligo, nek duoblan membrecon, individue samtempe en la speciala kaj en la ĝenerala (neŭtrala) asocio».

Jes, tio estas la idealo, kiun ni ofte proponis: katolikoj devas organizi sin en speciala asocio, sed kiam temas pri disvastigo de Esperanto por la ĝenerala bono de la homaro, amike kunlabori kun la ĝenerala, sed, atentu, **kun tiu ĉi diferenco**, ke ili estu **individue** membroj de katolika asocio kaj kunlaboru kun la neŭtrala ne individue sed kiel **organizo**. Tiu sistemo estas de Monsinjoro Van Eynde en la IKUE-Kongreso en Antverpeno komplete aprobita kaj rekomendita kaj la alia samtempe malaprobita. Sed, bedaŭrinde, I. E. L. ne akceptas tiun sistemon, ĉar ĝi ne akceptas katolikajn organizojn en sia sino. Ĝi nomas la katolikajn organizojn **fak**-organizojn. Ni preferus, ke I. E. L. estu federacio de **ĉiuj** aliaj ligoj, ĉu **fak**- aŭ **naciaj** ligoj, kiuj ĉiuj havu siajn delegitojn en I. E. L., kiel unu registaro konsistas el diversaj partioj, kiuj kunlaboras por la ĝenerala bono. Laŭ tiu sistemo oni

povus skizi belan kaj utilan labormanieron kaj Esperanto progresus pli rapide ol nun.

Ni informiĝis el Ameriko, ke multaj el E. A. N. A. intencis fari al la Kongreso en Bern hazarde preskaŭ la saman proponon. Ili jam ellaboris lutan planon de tia federacio, kiun ili nomas T. E. C. O. (Tutmonda Esperanto Centra Organizo). Tiu plano tamen ne estas ekceptita de la kunveno de E. A. N. A. kaj vere ankaŭ ne komplete plaĉis.

## NIA STELO.

En tiu revuo de la IKUE-sekcio en Jugoslavujo, la prezidanto kaj redaktoro publikigis traŭnan artikolon pri «Libereco», en kiu li montras, ke tiuj, kiuj plej laŭte kriis pri libereco, egaleco, frateco, ekzercas mem **senbridan** liberecon sed ne lasas al aliaj eĉ la **nesanan** liberecon.

Tiu artikolo aperu ankaŭ en Espero Katolika, sed sen la eraroj koncerne la pronomon refleksivan, kiajn ofte faras la parolantoj de slava lingvo.

## FLANDRA ESPERANTISTO.

En la artikolo «Vox Populi», en kiu la redaktoro preparolas la enhavon de F. E., kia li kaj la legantoj deziras ĝin, trafas nin la eldiro pri la Bibliografio-rubriko: «Ni zorgos, ke tiu parto estas objektive, kaj kiel eble plej komplete, kontribuata de kompetentaj samideanoj». Ankaŭ trafas jena parto: «Por kio koncernas la moralan kaj ideologian flankon de la enhavo, ni estas konsciaj, ke, abonante nian revuon, ni aj legantoj neniel atendas de ĝi, ke ĝi estu la parolilo de iliaj personaj konceptoj en aferoj, kiuj nek rilatas la lingvon nek la movadon..... Ĝi estu morale altstara, ĉar religia konvinko estu respektata kaj estu, kiel la redaktoro diras: «zorgeme evitata ĉio, kio povus ofendi iun ajn en lia persona aŭ privata opinio». Ni atentigas, ke tiu principo postulas ke ekzemple kontraŭkatolikaj libroj ne simple estu recenzataj aŭ propagandataj, kun tuta silento pri ilia kontraŭkatolika enhavo. Tia recenzo, sen tiu mencio, estas vera ofendo de la katolika leganto, kiu nur ekscios la malamikan enhavon de la libro, kiam li aĉetis kaj legis ĝin. Li rajtas **antaŭe** scii, kion li aĉetas. Kiam do la recensota libro ne estas neŭtrala, tiam la recensisto, por neniu ofendi, devas indiki tion. Ni esperas, ke ankaŭ la nova redaktoro de F. E. komprenos la aferon tiel. Alie ja la recenzo ne estas «objektiva kaj **kompleta**».

Koncerne la moralan altstarecon, pri kiu la redaktoro parolas, ni vere ĝojas, ke oni fine kuraĝas publike aserti en Esperantrevuo, ke la morala altstareco estas ĝenerala bono, kiun la Esperantistoj alcelu. Sed tiu principo denove postulas, ke oni ne recenzu aŭ propagandu malmoralajn librojn. La librorecensado estas do koncerne la neŭtralecon kaj moralecon vera atentinda tasko. Sed, bone konsiderate, kio estas morala en la okulo de neŭtrala homo? Ĉu lia principo pri moraleco estas fidinda? Ĉar la moraleco laŭ vidpunkto de kristano estas alia ol la moraleco laŭ vidpunkto de komunisto aŭ alia isto. La redaktoro espereble intencas la moralecon laŭ la vidpunkto de la plej granda parto de siaj legantoj.



# APERIS:

## NIEUWE ROMANSERIE.

Door de socialistisch-communistische Esperanto-vereeniging «Federacio de Laboristoj-Esperantistoj» wordt wederom zooals vorig jaar een serie romans uitgegeven. Om onze lezers reeds op voorhand over de te verschijnen boeken in te lichten, het volgende:

Van Sienczewicz zal verschijnen «La Lanternisto kaj aliaj prozaĵoj», in de vertaling van Kabe. Deze vertellingen verschenen reeds dertig jaren geleden in «Lingvo Internacia» en «Internacia Krestomatieto»; het boek bevat ook de verzameling, die in boekvorm verscheen getiteld: «Pola Antologio».

Sienczewicz schreef veel schoone en goede romans, ook enkele die streng voorbehouden zijn. Van deze verhalen kunnen we voorloopig slechts zeggen, dat ze waarschijnlijk voor alle volwassenen geschikt zijn.

Een ander goed boek is: «La batalo de l' Vivo» van Charles Dickens, de bekende Engelsche schrijver uit de 19de eeuw. Dit boek is de eerste vertaling acor Zamenhof zelf gedaan.

«La Taglaboristoj» van Hans Kirk, uit het Deensch vertaald door L. Friis en W. Jensen, beschrijft het leven van daglooners in een Deensch dorp. Hun toestand is medelijdenswaardig in alle opzichten, onvoldoende loon in de zomer, geen werk in de winter, geen degelijke ontspanning, zelfs geen begrip van hun ellende. Doch er wordt een cement-fabriek in het dorp opgericht. De daglooners worden fabrieksarbeiders, krijgen in hun omgang met hun meer ontwikkelde medearbeiders uit de stad, meer idealen en bewustzijn van hun menselijke waardigheid. Ten slotte wordt er zelfs een syndicaat opgericht. — Dit boek heeft waarschijnlijk een socialistische strekking en verdient daarom mogelijk eenig voorbehoud. (III-IV).

«La Perfido», in de vertaling van W. Kruit, is een produkt van de Nederlandsche schrijver A. M. de Jong, die **meestal vinnig antikatholiek is en agressief socialistisch**. Ook in zedelijk opzicht zijn zijn werken dikwijls niet naar behooren. Dit boek verdient dus streng voorbehoud (III).

«Judoj sen mono» van Michaël Gold, werd uit het Engelsch vertaald door George Saville. Dit werk is om zijn **brutale hatelijken tegen het Kristendom en zijn kommunistische tendenz** zeer streng voorbehouden. (II).

Het zesde boek «La vojoj estas nekonataj» is van de Hongaar Lajos Kassak, een schrijver van revolutionair-socialistische romans. Het eenige boek, dat van deze schrijver tot nu toe in het Nederlandsch werd vertaald, bevat meer socialistische propaganda dan letterkundige waarde. Van dit werk behoeven we niets beters te veronderstellen. Het verdient om zijn strekking in elk geval tot de categorie II - III gerekend te worden.

In welke volgorde deze romans zullen verschij-

nen, weten we niet, doch de drie hier laatst genoemde boeken behoreen zeker niet thuis in de bibliotheek van een katholiek Esperantist. **Besteed uw geld slechts voor boeken die uw hoogste goed eerbiedigen!**

I. — Jarmiloj pasas. Universala (mond)historio, originale verkita en Esperanto de H. Haefker.

Legu pri tiu ĉi libro en sekvanta numero. Ni jam diras, ke ĝi estas entute nescienca, falsa kaj kontraŭkatolika tiel nomita «historio».

C. v. H.

# KATOLIKA ESPERANTO INSTITUTO

## GOED NIEUWS VOOR DE PROPAGANDISTEN.

Om het onze propagandisten goedkooper te maken, hebben wij besloten de prijs van het propagandamateriaal merkkelijk te verlagen:

Beknopt leerboekje van Maassen: vroeger Fr. 2.—  
nu nog slechts: Fr. 1.—  
De spijker op den kop geslagen: vroeger Fr. 2.50  
nu nog slechts Fr. 1.—

Bestel ze onmiddellijk door storting op postcheckrekening Nr. 4549.84 van het Kath. Esperanto Instituut.

Bij bestelling van 10 exemplaren ontvangt men één gratis.

## LIBROJ-AMANTOJ.

Vi certe ne jam konas ĉiujn jenajn librojn, kiuj certe interesos vin. Notu ilin kaj mendu kiel eble plej baldaŭ.

Het Esperanto A Examen — De Waard	Fr. 16.—
Het Esperanto B Examen — De Waard	Fr. 45.—
Het Esperanto A Examen — De Waard	Fr. 16.—
Demandaro kaj Respondaro — De Waard	Fr. 23.—
La Verbo en Esperanto — Jung	Fr. 10.—
Mi parolas Esperanton — Rozendal	Fr. 15.—
Infanoj de Bethlehem	Fr. 5.—
Infanoj en Toronto — 2a Parto	Fr. 18.50
La Ringo de la Generalo	Fr. 15.—
Per Motociklo tra 3 landoj	Fr. 6.—
Ĉu vi scias tion pri Framasonismo	Fr. 5.—
Se aŭskultas la animo	ing. Fr. 10.—
	geb. Fr. 15.—
Eigen Taal als Esperanto	Fr. 42.50
Plena Vortaro de Esperanto	Fr. 70.—
Groot Woordenboek door Van Straaten	Fr. 80.—
Beknopt Woordenboek door Van Straaten	Fr. 40.—
Virina Koro, Sabbe	Fr. 5.—



Vivo de Zamenhof, Privat . . . . .	Fr. 20.—
Ora Ŝtuparo . . . . .	Fr. 29.—
Ŝi, door R. Haggard . . . . .	Fr. 29.—
Vojo Returne, Remarque . . . . .	Fr. 29.—
Kan-U-Go, Esperanto-kaartspel . . . . .	Fr. 20.—
Lexicon, Esperanto-kaartspel . . . . .	Fr. 20.—
Unua Eŭkaristia Esperanto-Mondkunveno	Fr. 25.—
Plena Gramatiko de Esperanto, Kalocsay	Fr. 84.—
Verda Koro, Baghy . . . . .	Fr. 16.50
Barbro kaj Eriko, Schneider - Carlsson .	Fr. 4.—
Kompaktinda Klem, Merchant . . . . .	Fr. 10.—
Schidlof-woordenboek . . . . .	Fr. 25.—
Nia Mesmistero, preĝlibro . . . . .	Fr. 12.—
Tri-Standardoj-kanto de la FUKA-anoj .	Fr. 5.—



V. — NIA MESMISTERO; angle verkis originale W. Roche S. J.; el nederl. traduko de O. Huf S. J. Esperantigis Patro J. F. Smeehuijzen S. C. J. Bindita 130 paĝoj, 10½ x 15½ cm. Prezo: 12 fr.

Jen denove preĝareto en Esperanto sed nun ne ordinara preĝareto sed mespreĝareto kaj eĉ tute speciala, tute unika mespreĝareto. La celo de la libreto estas: atingi ke la kreduloj ne nur ĉeestu la Sanktan Meson, sed ankaŭ, kio bedaŭrinde ĝenerale ne okazas, kunvivante kun la preĝoj kaj agoj de la celebranta sacerdoto, kunoferu tiun Dian Oferon. Kaj tiun celon ĝi volas atingi ne per simpla traduko de la mespreĝoj, kiel en la ordinara mespreĝaroj, sed per « klarigaj plivastigajoj de la neŝanĝeblaj Mespreĝoj. Per ĉi tio la esenco de la Ofero, kaj la misteroj kaj homaj bezonoj, sur kiuj baziĝas la Liturgiaj preĝoj kaj Messolenajoj, plie antaŭeniĝas. La ordinara Mespreĝojn antaŭiras kelkaj pli enkondukaj preĝoj pri la esenco kaj la signifo de la Ofero kaj pri la kvar celoj aŭ intencoj, pro kiuj la Sankta Meso estas celebrata » (el la enkonduka parolo de la tradukinto).

Tial ke la preĝoj ne estas tradukoj sed klarigaj plivastigajoj, ne estas eble dum ĉiu Meso diri ĉiujn preĝojn. Sed tio ne gravas. Oni povas fari elekton laŭ siaj deziroj kaj pieco, « konsiderante la fundamentajn ideojn kaj la plueniradon de la Ofero », tiel ke oni jen tiujn, jen tiujn preĝojn plivastigite kunpreĝas kun la sacerdoto celebranta, kio tamen ne malhelpas la kompletan esencan kunvivadon kaj eĉ havas la utilon, ke oni povas preĝi pli intime kaj pli profunde, kaj pro la variado ne tiel facile inklinas al senatenta kutimo-preĝo. Eĉ el kelkaj preĝoj, ekz. la konsekradaj preĝoj, oni povas senĝene elekti parton.

Generale ni ne aplaŭdas la eldonadon de Esperantolingvaj preĝaretoj, ĉar ni ne komprenas, kial oni private preĝus en Esperanto. Oni ja plej facile kaj plej intime preĝas en sia gepatra lingvo, kaj inter Dio kaj ni ne bezonas internacian lingvon. Sed ni jes akلامas la eldonadon de tiu ĉi preĝareto, ĉar unue: ĝi estas tiel taŭga kaj unika preĝareto, kiel ne ekzistas en ĉiu nacia lingvo, kaj per Esperanto ĝi do fariĝas uzebla ankaŭ por alilandanoj, kaj due: ĝi taŭgas kaj estas en Esperanto eldonita ne nur por privata preĝado sed precipe por komuna laŭta preĝado en IKUE-kongresoj. Por fari la libreton uzebla por tia amasa kuna preĝado, la tradukinto verkis ĝin ne en prozo sed

en versoj, por kiuj li uzis 4 verspiedojn: la jambon, la trokeon, la daktilon kaj la anapeston, kiuj ĉiam estas indikitaj supre de la preĝoj. Tiu versifarmo havas tamen ankaŭ malutilon, ĉar tial, ke la tradukinto por « reprodukti la sencon (de la nederlanda teksto) laŭ la pleneco de la pensoj » volis traduki laŭeble vorton post vorto, li devis pro la dezirata ritmo kelkfoje iom deformi la stilon, perforti la vortojn. Tiel li uzas neordinare la prepozicion laŭ, sennecese la prefikson ek, tro libere la apostrofadon kaj tial formas strangajn vortojn, kiujn oni tamen malfacile povas nomi sendube eraraj, escepte kelkajn, ekz. **kiomaj momentoj**; **ĉielondirekte** (ĉielen aŭ ĉielon-direkte); **vindirekte** (ĉu vi pensas nun al vi aŭ al vino?); **sur min rajtojn** (al mi). La devigata ritmo do faras la tekston ofte ne tuj kaj ne bone komprenebla. Tial oni antaŭ la unua uzado bone tralegu kaj trastudu ĝin, ankaŭ tial, ke la enhavo estas tiel riĉa, ke ĝi eĉ post plurfoja uzado restas neelĉerpebla lonto, kiu havigas ĉiam freŝajn belafinojn, kaj preĝajn kaj instruajn.

Ankaŭ ni rimarkis, ke oni uzas por la preĝanto la unuan personon jen plurale jen singulara kaj eĉ iam ambaŭ formojn en la sama preĝoj. Kial tio?

La preĝaroj estas aldonitaj sur aparta paĝo; nur kelkaj el ili ĝenas.

Vere, tiu libreto bele eldonita, estas **trezoro**, kiun ĉiu katolika Esperantisto posedu kaj **uzadu**.

Per tiu ĉi mespreĝareto oni pli bone komprenos kaj do ankaŭ pli ĝuos la Sanktan Meson.

C. v. H.



V. — LA JUNA VIVO. Lernolibro nur en Esperanto, kun multaj desegnaĵoj, celanta instrui infanojn laŭ la rekta metodo. Paĝoj 32. Prezo: 4 fr. Eldonita de « La Juna Vivo » Westgraftdijk, Nederlando.

Malmultekosta, ideala lernolibro por kursgvidantoj, kiuj havas lernantojn, kiuj ricevis nur la instruon en elementa lernejo. Ĝi estas facila por la kursgvidanto kaj amuza por la lernantoj. Kun iom da iniciato « La Juna Vivo » certigas al la kursgvidanto bonegan rezultaton.

R. D. B.



V. — DERTIG JAREN. Geschiedenis van de Katholieke Esperantobeweging in Nederland, door Nico Hoer jr. 96 bladz. uitgegeven door « Nederlanda Katoliko ».

Geschiedenis lezen is niet altijd interessant, maar deze geschiedenis lezen is zelfs boeiend. Nico Hoer kent het; klaar, zakelijk en levendig beschrijft hij om zoo te zeggen volledig de geschiedenis van onze zustervereniging « Nederlanda Katoliko ». Het werkje, of liever zijn schrijver, dwingt onze bewondering af. De al te vele zinnetjes « tusschen haakjes », waarvan velen gemakkelijk konden vermeden worden, maken het lezen ietwat onaangenaam en minder vlot. Wat er echter ook spijtig aan is,

zijn de vele Fransche woorden. Maar schrijver is journalist en men weet dat het nu eenmaal de « mode » is van de Nederlandsche journalisten, veel nuttelooze (en soms verkeerde) Fransche woorden te gebruiken. Zij schijnen niet te wien dat ze daarmee in het geheel geen dienst bewijzen aan het volk, dat er trouwens in zijn breede lagen ook geen genoegen mee neemt. Indien ze gaarne pochen op hun kennis van een vreemde taal, dat ze dan liever eens Duitsche woorden gebruiken, die kunnen misschien in de naaste toekomst wel eens van pas komen. Ondanks die vlekjes, voor Nederlanders zoo gewoon als sproeten op een roodharige, blijft het boekje een juweeltje voor elk N. K.-lid en ook voor ons bevat het een geschiedenis waaruit te leeren valt.

C. v. H.

Bestel altijd al uw Esperantoboeken op het Kath. Esperanto-Instituut, v. z. w. d. E. Segerlaan 14, Wilrijk. Het is in uw eigen voordeel. Verzending franco!

Voorloopig gelieve men na een bestelling eenige dagen geduld te hebben, daar de bestuurder van K. E. I. gemobiliseerd is.

## REDAKLIA LETERKESTO

F-ino Anna Begodt, Beveren Waas. — Pardonu, ke mi ne plenumis mian dumkongresan promeson zorgi por via jarlibro. Mi vere forgesis. Nun ĉio estas enorda. Dankan pro la alsendo de la fotografajo kaj korajn salutojn.

S-ro H. P. Saunders en London. — Dankon por via karto. Ni vere ĝojas ke F. K. tiel plaĉas al vi. Bonvolu represi niajn korespondajn anoncojn en via organo, kies lastan numeron ni bone ricevis. Ni esperas post iom da tempo povi helpi vian ligon.

Ĉu viajn kongresfotografajojn sukcesis? Korajn salutojn.

S-ro P. Golobić en Ljubljana. — Ni esperas, ke vi regule ricevas Flandra Katoliko. Ni bedaŭras, ke ni ne ricevas vian « Nia Stelo ». Bonvolu ankaŭ vi represi niajn korespondajn anoncetojn. Korajn salutojn

S-ro R. Molera, Moyà, Hispanujo. — Mi esperas ke vi bone ricevis mian sendaĵon kun broŝuroj kaj poŝtmarkoj. Vi bonvolas daŭrigi la pm-interŝanĝon. Sal. korajn. C. v. H. kaj L. C.

Frato Arnoldo, Baarle Hertog. — Via propono koncerne la vorton « klaŭstro » estos pritraktata en sekvanta numero. Kor. salutojn!

F-ino Bep de Vetten, Voorburg, Ned. Koran dankon por via letero. Pardonu ke mi ankoraŭ ne respondis. Paciencon kaj korajn salutojn!

M. De Valck, Gent. — Kara amiko ankoraŭ unu fojon paciencon, ĉu? Kor. sal.

## Nijmegen Centrale Esperanto Commissie

### AFDEELING VLAANDEREN

## MOBILISATIEPRIJS

voor deze uitstekende cursus  
(uitgave 1935) :

**25 FR.**

Te storten op postcheckrekening  
209034 van Lic. L. Calloens,  
Erembodegemstr. Aalst.

Aantal zeer beperkt.

Tijdelijk aanbod. Vrachtvrij.

## ANONCETOJ

senpagaj por niaj membroj

Eksterlandaj katolikaj Esperantorevuoj bonvolu represi niajn korespondajn anoncojn. Ni represos iliajn.

Deko da gefraŭloj 16 — 30 jaraj deziras korespondi kun geesperantistoj en la tuta mondo. Skribu multnombre al: F-ino M. J. Top, Nieuwstraat 12, Veurne (W. VI)

Por propagandi Esperanton, sendu al mi Esperantaj revuojn (novajn kaj malnovajn), turismajn prospektojn, broŝurojn, poŝtmarkojn, ilustritajn poŝtkartojn, glumarkojn ktp. Kompense vi ricevos poŝtmarkojn el Hispanujo, ilustritajn kartojn ktp. laŭ deziro. — R. Molera, del. de I. E. L., Str. Hospital 13, Moyà (Barcelona), Hispanujo.

Maliĉa kaj malsana knabino deziras lerni Esperanton. Kiu povas kaj bonvolas havigi al ŝi taŭgan novan aŭ malnovan lernolibron, sciigu tion al nia redakcio, kiu tiam informos la adreson por sendi la libron.

S-ro Van Geit, Groote Baan, Herdersem, Belgujo, deziras korespondi kun Eŭropanoj.



# D I S T R A P A Ĝ O

**Bonaj gesolvintoj No 10.** — V. d. Laak, Bekaert, Top, Goedhart, Frato Arnold, S-ino Meurrens, Naster, Magda De Rop, Maria De Rop.

**No 11.** — Ĉar ni rimarkis ke multaj ne estas ŝakludistoj ni estonte ne plu enmetos tiajn problemojn. (Bonaj solvoj envenis nur de F-inoj De Rop).


**Nr. 12.** — V. de Laak, Top, Goedhart, Meurrens, Magda De Rop, Bayens, Frato Arnold, Wijnendale, M. Naster.

Pri tiu problemo multaj esprimis dubon pri la vorto « ento ». Laŭ Van Straaten ĝi estas « wezen ». Laŭ Plena Vortaro ĝi signifas « parazitaj-intestaj vermoj ».

**No. 13.** — V. de Laak, Top, Goedhart, Meurrens, Magda De Rop, Bayens, Frato Arnold, Wijnendale, M. Naster.

Ĉiuj tiuj do gajnas unu poenton pro bona solvo. Relegu tiurilate la novan metodon pri niaj enigmoj en F. K. No 10, paĝo 279. Ĉar pro la nuna cirkonstancoj F. K. nur eliros dumonate, la templimo estas plilongigita al du jaroj, por ke ni povu enmeti 20 enigmojn.

## KRUCVORTENIGMO No 14.



**Difinoj. — Horizontale:**

1. Porkurace enspiri — Stelo
2. Prepozicio — forlasi sian oficon (r)
3. Rita vesto (r)
4. Gento aŭ klano (r) — muzikverko
5. Loĝejo el la Malnova Testamento
6. Alte taksi (r) — Stelo
7. Elektra kondukilo bezonas. .... — Juna persono.

**Vertikale:**

1. Afable peti — pligrandiĝi

2. Varmigi — Eŭropano
3. Simbolo de la venko — Abunda kolekto
4. Prefikso — sufikso (r)
5. Nombro — Granda ujo
6. Prepozicio — Trinkajo (r)
7. Denove fari (r) — Apartigas kontinentojn (r)
8. Militilo — neĝusta
9. Loko de deveno (r) — Oceanio estas.....

## SILABENIGMO No. 15.

BO CO CO DO DU DU EO EO ER FI FO GO GA  
JA KO KO KO LI LI LO LO MO NO NO OA OL  
OR OR OR OS RA RA RO RO RU ŜO TA TI TO  
TO UN VI VI ZO (44).

El tiuj ĉi 44 silaboj kunmetu vortojn laŭ la jenaj signifoj:

1. Fruko
2. Astronoma vojo
3. Koloro
4. Nobela titolo
5. Metala mineralo
6. Konsulti la sorton
7. Geometria formo
8. Kokino faras
9. Mezuro de pezo
10. En kiu plejmultaj homoj mortas
11. Refaldita bordo
12. Tempmezuro
13. Malantaŭa parto de pejzaĝo
14. Malmola substanco ĉe vertebruloj
15. Ĉarmegi
16. Malvarma, estas tre ŝatata somere
17. Ebena limiganta surfacojn
18. Veĝetaĵo kies fibroj estas plej utilaj
19. Grafika signo
20. Grasa fluaĵo
21. Necesa al veturiloj
22. Ŝatata loko en dezerto.


La unuaj literoj de tiuj vortoj montros al vi ne tre flatan diradon.

Ambaŭ solvoj ensendotaj antaŭ la unua de majo, al la sekretario de F. U. K. E.

## RUSA HUMURO.

Lenin, rakontas muĝiko al siaj filoj, donacis al ni tri aĵojn: la inteligentecon, la honestecon kaj la bolŝevismon. Sed tiujn ĉi tri aĵojn ni ne povas posedi samtempe: nur maksimume du el ili. Pro tio, Ruso povas esti inteligenta kaj bolŝevista; tiam li ne estas honesta. Aŭ li estas honesta kaj bolŝevista; tiam li ne estas inteligenta. Aŭ ankoraŭ li estas inteligenta kaj honesta, sed tiam li ne estas bolŝevista.

La libro  
kiun  
ĉiu  
Esperantisto  
devas posedi



Verkita de: PROF. E. GROSJEAN-MAUPIN, direktoro de la sekcio « Komuna Vortaro » ĉe la Esp-ista Akademio; A. ESSELIN; S. GRENKAMP-KORNFELD; PROF. G. WARINGHIEN; membroj de la Esp-ista Lingvo Komitato.

NUR TIU PERSONO, KIU POSEDAS KAJ UZAS ĈI-TIUN VORTARON, MERITAS LA BELAN NOMON: SERIOZA ESPERANTISTO!

Prezo 70 fr. Vendoinstituto de F.U.K.E. Eg. Segerslaan 14, Wilrijk.



FUKE-leden uit het Antwerpsche !

Voor uw           

## Heeren- & Kinderkleeding

GEMAAKT EN NAAR MAAT

is het beste adres :

**J. PAESMANS**

# IN 'T DUIFKEN

Koepoortstraat 64, Antwerpen. - Tel. 217.51

5 % AAN ONZE LEDEN !!

LIKEURSTOKERIJ

## DE RAAF

■ ALLE SPECIALITEITEN ■

ALLE GEKENDEN WIJNEN

## J. VANDEUN-JESPERS

TURNHOUSCHE BAAN, 277

BORGERHOUT (ANTW.)

# PRESEJO

## H. & H. BRAEKEVELT

Statedreef, 177 - Tel. 1080

ROESELARE

Specialiteit :

## ESPERANTO - DRUKWERK

## Atentu Esperantistoj !!

Por modernaj domornamaĵoj,  
ŝtalaj mebloj ktp., por moderna aranĝo de  
via dominterno, ekzemple pentrado kaj  
tapetado, turnu vin al :

# CAMIEL TOUSSEYN

dominterno-arkitekto,

domkolorigisto-tapetisto,

Hoogstr. 44, JABBEKE (W. VI.)

(laboras tra la tuta lando

10 % da rabato por Esperantistoj)

**HALT ! STOP !**

Het beste Woordenboek  
voor ieder Esperantist !

**GROOT WOORDENBOEK  
VOOR ESPERANTO**

door **A. J. van Straaten**

690 bladz. moderne linnenband, puik papier.  
Prijs 80 fr. Katholiek Esperanto Instituut.

Steunt onze Aankondigers.

Zij steunen ons,

en hebben goede waar.



## SIGARENFABRIEKEN ROMANO N.V.

**GHEEL (Antw.)**

ALLEEN FIJNE KWALITEIT SIGAREN, IN ALLE PRIJZEN  
GROOTE KEUS. — HAVANA SIGAREN.

◆ Prijskaarten en stalen van sigaren op aanvraag. ◆